

# SUDFRANCIA ★ STELO

N°153 - 2a kvaronjaro 2000 - 2° trimestre 2000 - 10 F

Dulingva bulteno eldonita de la E°- Federacio de Langvedoko-Rusiljono  
*Bulletin bilingue édité par la Fédération d'espéranto du Languedoc-Roussillon*

Jarabono / Abonnement : 35F al pĉk / au CCP 956-28 P Montpellier

☆☆

## EDITORIAL

Parmi les principaux obstacles à la diffusion de l'espéranto figurent le scepticisme ( comment une langue simple et "artificielle" pourrait-elle fonctionner ? Où utiliserais-je cette langue ? ) et la diffamation . Dans cette dernière catégorie, les propos récents du Figaro ( feu, l'espéranto ) et de William Leymergie sur France-Inter ( l'espéranto ? un bide total ) . Nos lettres de protestation n'effaceront pas le mal causé . A force d'entendre répéter des contre-vérités, le public "avale" sans vérifier . Est-ce trop demander à des journalistes de s'informer avant de prétendre informer ? Sur Internet, en tapant le mot "esperanto", avec le moteur de recherche Altavista par exemple, des milliers de pages d'informations sur le sujet sont disponibles ...

A nous peut-être la responsabilité de témoigner de ce que nous avons vécu en Espérantie ou par l'espéranto, pas seulement dans le groupe local ou les revues espérantistes, et d'abord de participer ! Les occasions ne manquent pas, spécialement pendant la période estivale . Après les "Journées de la Solidarité" de St Chamond et KAFE, festival culturel de Toulouse, les congrès internationaux de Tel-Aviv (UEA), Moscou (Sat), Hong-Kong (Tejo), les stages de Grésillon ou Bouresse, etc,etc, nous avons chez nous la "Semaine internationale" de Sète (26-8 au 2/9), en Catalogne la 8° semaine de tourisme et culture à Blanes (30/9 au 7/10). Et puis, si vous passez les vacances "hejme", il y a de nouveaux livres et de nouveaux CD en E°. Pour être crédibles dans notre défense de la langue internationale, il importe aussi d'en posséder une bonne maîtrise... et aussi d'unir nos efforts pour réaliser quelques projets .

Notez déjà notre journée d'automne à Sète le samedi 2 Septembre (voir détails p. 3 ), les foires aux associations de Béziers (9/9), Montpellier (10), Agde (16), Arles (24) La fédération possède du matériel d'exposition et vous épaulera en hommes et matériel si vous voulez participer à une foire aux associations . Encore faut-il le signaler assez tôt !

Faisons savoir nous-mêmes ce qu'est et ce que n'est pas l'espéranto . C'est encore la meilleure formule pour éviter les contre-vérités !

Jean Hénin

---

**Dernière minute :** en complément de l'éditorial, article reçu de Francis Bernard, notre secrétaire adjoint, sur la manifestation de Millau (procès de José Bové)

**Le stand espéranto à Millau**

Tenu par des espérantophones de différentes associations ou indépendants, le stand ESPERANTO a obtenu un formidable accueil du public .

Durant les deux journées des 30 juin et 1° juillet 2000, à MILLAU, pendant le procès de José Bové, le stand ESPERANTO n'a pas désempilé ! Les banderoles annonçaient : "ESPERANTO, LANGUE INTERNATIONALE", "LE REMEDE A LA MONDIALISATION", "LA LANGUE DE L'AMITIE". Les deux panneaux explicatifs ont été continuellement lus.

Sans cesse, des questions ont été posées à la dizaine d'espérantophones présents : "Je croyais que cela n'existait plus"; "Combien parlent l'espéranto dans le monde ?"; "C'est l'anglais, la langue internationale"; "Tout le monde parle anglais"; "Expliquez moi comment est cette langue"; "C'est formidable !"; "Je vais l'apprendre, à qui faut-il s'adresser ?"; "Pourquoi ne l'apprend-on pas dans les écoles ?"; "Pourquoi ne nous en parle-t-on pas ?"...

Des milliers de personnes, parmi lesquelles beaucoup de jeunes, ont découvert ou ont retrouvé avec plaisir l'ESPERANTO. C'est d'abord la langue de l'amitié et cela pourrait être la langue des associations non gouvernementales, la seconde langue des peuples, à la portée de tous, avec un minimum d'heures d'apprentissage...

---

**Attention !** Si le cercle à gauche comprend une croix rouge, c'est que, malgré nos rappels, vous n'avez pas réglé votre abonnement pour cette année et nous devons vous rayer de notre liste d'abonnés . A moins d'une réaction rapide de votre part (voir ci-dessus n° de CCP de la Fédération) .

\*\*\*\*\*

## FEDERACIA KONGRESO EN QUISSAC (2000-4-8)

Partoprenas 40 personoj . Nia juna amiko Mikaelo Simon, kiu loĝas en Quissac kaj pretigis preskaŭ ĉion <sup>1</sup>, bonvenigas nin en esperanto . La prezidanto Jean Hénin (JH) dankas la partoprenantojn pro ilia veno kaj petas ĉiun sin esprimi koncize kaj laŭeble ne ripeti tion, kion ĉiu povis legi en la ĵus aperinta "Sudfrancia Stelo" (SFS). Malnovaj numeroj de SFS same kiel la kolora broŝuro pri Montpellier estas disdonataj al novaj geesperantistoj . La kunveno komenciĝas kun duonhora malfruo kaj posttagmeze estas antaŭvidite aŭskulti kasedojn kaj spekti vidbendojn, do necesas iom rapidi . Ĉar ni estas tro multaj por nin prezenti individue, ni prezentas nin laŭ urboj aŭ departementoj; ĉiuj departementoj estas reprezentataj . Pluraj personoj petis senkulpigon pro neveno. Nia samideano Kossi Logossou el Togolando ankoraŭ ne ricevis vizon; lia vizito estas prokrastita kaj estas problemoj pro lia gastigado en Perpignan . JH informas pri la partopreno de Claude Longue-Épée, vicprezidanto de UFE, en nia aŭtuna kunveno komence de Septembro . Ĉiuj konsentas pri la okazigo de la kunveno en Le Lazaret, Sète, <sup>2</sup> fine de la "internacia semajno" . JH ankaŭ anoncas la baldaŭan viziton de juna Polo, turisma gvidisto, kiu ŝatus malkovri nian regionon . Montpellieranoj invitas al komuna manĝo ĉe "Géant Casino" la 6an de majo .

Esperanto vivas, la lingva problemo daŭras kaj JH donas kelkajn freŝajn ekzemplojn, ne menciitajn en SFS :

- francaj pilotoj devos ekde nun rilati kun la kontrolturo de Roissy en la angla . Ĉiuj ĉeestantoj protestas <sup>3</sup>
- jam aliĝis pli ol 1000 personoj al la kongreso de Tel-Aviv . Post Kroatio kaj Brazilo, la Universala Kongreso eble okazos en 2003 en Svedio. La Junulara Kongreso disvolviĝas ĉijare en Hong-Kong, en 2001 en Strasburgo. <sup>4</sup>
- aperis nova praktika vortaro franca-esperanto/esperanto-franca; ĝi kostas 150F k. estis eldonita de Sat-Amikaro .
- en Bretonio junulo estas pagota dum 5 sinsekvaj jaroj por prezenti esperanton en lernejoj .
- eĉ se la peticio pri E<sup>o</sup> kiel elekteleco je Bakalaŭro ne estis sukcesa, ĝi tamen vekis la atenton de pluraj politiki-kuloj (skribaj demandoj al la ministerio pri edukado, ktp)
- KAFE okazos en Tuluzo komence de julio . La apogo de esperantistoj estas bezonata por sukcesigi tiun eventon . Same Floreal Martorell jam aperigis 8 kompakt-diskojn kun diversaj muzikistoj kaj grupoj . Ni subtenu lin !
- Anstataŭ kongresi, UFE aranĝas labor-semajnfinojn por aktivuloj en Boulouris (Var) . Nia reprezentanto estos Jean-Claude Roget .

Koncerne federaciajn aferojn, nia kasistino Lucette Négron mencias la ĉefajn elspezojn : reklamo en "Midi Libre", aĉeto de paneloj por ekspozicioj (videblaj en la salono). Pluraj duon-decidoj atendas konfirmon . Se la reklamo ne rezultigis multajn informpetojn, tamen ĝi ebligis longan artikolon (intervjuon kun Ges. Bernard). Propono de reklamo en alia gazeto (La Gazette de Montpellier) : kial ne, sed prefere ni reklamu en tutregiona gazeto . Nova subvenci-peto : necesas projekto kaj dosiero . Pri eventuala dosiero kaj subteninda agado, informi la vic-prezidantinon Monique Bernard - Col de Coperlac -48210 Mas St Chély .

Apogo al Greziljono : JH informiĝis kaj eblas aĉeto de sociaj partoj . Interkonsentite pri 50 partoj (5000 F) <sup>5</sup>. Aĉeto de la libro de B. kaj M. Robineau por disdono al bibliotekoj : kompreneble ĉiu portonto certigi pri disponigo al la publiko . Ni ne elspezu vane ! Ĉiu volontulo por tiu kampanjo sin anoncu kaj ni baldaŭ mendos la librojn . Ankaŭ eblas samtempe mendi por propra uzo kaj kontraŭ pago la libron en esperanto <sup>6</sup>.

La dua transpirena kongreso okazis en Manresa en oktobro 99, la venonta verŝajne okazos en Andoro .

La novaj statutoj estas legataj denove kaj akceptitaj (4 sindetenoj) .

La bulteno SFS aperas regule dank'al la du redaktoroj (JH+Francis Bernard) al kiuj oni sendu kontribuojn en la franca aŭ la esperanta antaŭ la limdato . Ne forgesu pagi/repagi vian abonon (novuloj povas ricevi SFS senpage dum unu jaro, kondiĉe ke oni sendos al ni la nomojn) . Niajn dankojn al André Capus, kiu prizorgas la presadon kaj ekspedon de la bulteno . La helpo de persono en Montpellier estas urĝe bezonata . La propono de pli dika bulteno kun reduktita poŝta tarifo ne aspektas urĝa . Propono de aĉeto de kombinaĵo (televidilo+magnetoskopo) por forumoj de asocioj, prelegoj, kongresoj kaj kunvenoj : necesas aĉeti aparaton kun sufiĉe granda ekrano ; ankaŭ trovi lokon sekan por konservi la aparaton, en la centro de la federacio . Rediskutinda punkto, kiam ni disponos pri pli da informoj, prezoj, ktp .

La financa kaj morala raporto estas unuanime akceptitaj.

Konsistigo de novaj komitato kaj estraro : kompletigas la komitaton Zohra Boubker, Claude Cayzac, Henryka Olek, Mikaelo Simon; Coralie Delnatte estas forstrekata (neniam partoprenis). La nova komitato estas akceptita (unu sindeteno) kaj ni ĝojas, ke en ĝi estas du gejunuloj .

René Llech-Walter estas unuanime konfirmata kiel Honor-prezidanto . La nova (provizora) estraro konsistas el : prezidanto : Jean Hénin ; vic-prezidantino : Monique Bernard; sekretario : Charles Gérard; help-sekretario : Francis Bernard ; kasistino : Lucette Négron; help-kasisto : Patrice Brandy <sup>7</sup>

Diversaĵoj : Thierry Saladin proponas , ke lia asocio "Réinsertion et Esperanto" prizorgu libroservon por la federacio . Konsentite (4 sindetenoj). Li informas pri baldaŭa semajnfina staĝo .

Claude Cayzac memorigas pri la perkoresponda kurso . Direktu al li novearbitajn personojn .





## VIVO DE LA GRUPOJ

### BEZIERS

Jen la lasta numero de S.F.S antaŭ la somera disiĝo. Eble, sub la suno kaj dum nenifarado, vi ne plu pensos pri nia grupo. Do, konservu zorge tiujn foliojn, ĉar, ekde la komenco de septembro, ni devos labori! Fakte, la forumo de asocioj "Les associations font les Allées" okazos sabaton la 9an de septembro. Antaŭe, ni devos decidi kion ni montros, kiuj deĵoros, ktp, ktp. Ĉu vi havas bonajn ideojn por allogi homojn kaj precipe gejunulojn?

Do, ni kunvenos ĵaŭdon 7an de septembro en nia klubejo (3a etaĝo). Ni preparos la dokumentojn por la 9a, ankaŭ por la 16a, ĉar ni partoprenos la Feston de Asocioj en Agde. Tie, ni bezonos ankaŭ helpant(in)ojn.

**Aliaj kunvenoj:** Ili estas fiksitaj je la **30a de septembro, 21a de oktobro, 18a de novembro** (14 h 1/2 Maison des Associations).

Zamenhofa-tago: je la 9a de decembro. Pliaj informoj en la venonta S.F.S.

### STAĜO:

Ĝi bone disvolviĝis en la unua semajno de junio. La nombro de staĝanoj estis pli granda ol dum la antaŭa staĝo: 37 regule partoprenis la kursojn kaj ni aldonu 4 kursgvidantojn. Ŝajnas, ke tiu aranĝo (4 kursoj) plaĉis. Kelkaj lernantoj, jam antaŭe, vizitadis la konversacian kurson de Sinjoro GUZZI, sed tamen, ne sentis sin sufiĉe lertaj por supera lernado ĉe Nina KORJENEVSKAJA. Do la prigramatika kurso de Thierry SALADIN estis pli taŭga por ili. Bedaŭrinde, ĉe la unua-grada kurso de S. BERNARD ĉeestis nur 3 lernantoj.

Dankon al ĉiuj sindonemaj kursgvidantoj.

Ĉe la fino okazis ekzamenoj: 6 kandidatoj por atesto pri Lernado, 7 por Praktika Lernado, kaj 3 kiuj provis nur Gramatikan antaŭteston. Tiu "granda" nombro levis kelkajn problemojn por organizado, sed, fine, ĉio iris glate. Ni deziras sukceson al ĉiuj.

En la vesperoj, Nina prelegis dufoje pri la rusa pentrarto, tre interesaj kaj bone dokumentitaj prelegoj. Sinjoro BOUMAN prezentis lumbildojn pri la U.K. en Aŭstralio kaj la ĉina paro parolis pri la ĉina (antikva kaj nuna) kulturo kaj la tradicia medicino kun... praktikaj ekzercoj de gimnastiko. Fine, Hélène VINCENT (de Nantes) alportis videokasedon kun filmo "INKUBUS" sonfarita rekte en esperanto. Dankon al tiuj bonvolemluloj.

La datoj de la venonta staĝo estas jam antaŭviditaj (19an-26an de majo 2001), konsento de Batipaume atendata.

Nova organizanto, ano de CBE, Christian HERBETTE anstataŭos Suzanne AUTHIER kiu emeritiĝos. Certe, li bezonos gehelpantojn: anoncu vin! Estas bone ke aliuloj renovigos la stilon de la staĝo. Espereble pliaj staĝanoj aldoniĝos al la "malnovuloj".

Ĝis la jaro 2001!

*Dekstre: parto de la akompananta foto de Sro Cheng.*

*En "La Marseillaise" de la 19a de junio aperis la sama teksto kun larĝa (25 cm) titolo: "Rencontres internationales et cordiales à Batipaume", ankaŭ kun foto. La lasta frazo: "Ĝis la venonta staĝo en 2201" entenas eraron. Ni ne atendos du jarcentojn, ĉu ?*

### Midi Libre

14/06/00

## CULTURE Cercle biterrois d'espéranto

# Quarante personnes au stage annuel

■ Le cercle biterrois d'espéranto organisait son stage annuel dans les locaux de Batipaume à Agde.

Venus de Nantes ou de Bordeaux, de Romans ou de Grenoble, de Nevers ou de Montpellier, une quarantaine de stagiaires s'initient à l'espéranto ou approfondirent leurs savoirs.

Quatre professeurs dirigent les cours. Mme Bernard enseigne le B A BA aux débutants ; M. Saladin centra sur la grammaire et prépara ses étudiants à l'examen du 2e degré ; M. Guzzi (italien) conversa avec ses élèves et Mme Nina Korjenevskaja (Russe) dirigea le cours supérieur.

A souligner le sérieux des formateurs et de leur enseignement et l'application attentive des participants.

A l'issue du stage certains passèrent les examens des 1er et 2e degrés. Les soirées pour être moins studieuses, étaient très intéressantes: Nina avec

des diapositives commenta la peinture russe; on visionna un film sur l'Australie et le congrès espérantiste (M. Bouman) puis "Incubus" une production américaine en version originale espéranto. M. et Mme Shen-Wang de Pékin en tournée de 3 mois en France, Allemagne, Suisse, parlèrent de la culture et de la médecine traditionnelles en Chine. Mme Wang fit une démonstration de gymnastique suivie d'exercices pratiques. Acteurs et chanteurs montrèrent leur talent.

Malgré une impression de vacances, le travail a été intense et fructueux. Le stage se termina comme il avait commencé: sous le soleil et dans la bonne humeur.

Le personnel de Batipaume a montré son amabilité et sa compétence coutumières, de même que les responsables et organisateurs du stage. Sans eux il ne saurait y avoir de rendez-vous habituel à Batipaume. ●





## **CENTRE CULTUREL ESPERANTO DE MONTPELLIER**

### **RAPORTETO PRI LA MONATA KUNVENO DE LA 6A DE APRILO 2000.**

De la 18a horo ĝis la 20a horo en la ĉiesdomo "l'Escoutaire", paroladeti Christian RIVIERE antaŭ 14 ĉeestantoj pri:

#### **ESPERANTO, ĉu skriba aŭ parola lingvo?**

Unue, li sin prezentis: li venas el Nantes, esperantiĝis antaŭ 9 jaroj kun la tuta familio (5 homoj) kaj venis en Montpellier por helpi Thierry SALADIN kaj lian asocion "**Réinsertion et Espéranto**" dum unu semajno. Li eklernis kun Sinjoro BOYER, kiu preferas skribigi kaj legigi gelemantojn antaŭ ol paroligi ilin. Kaj Christian konstatis ke lia instruisto tute pravis, ĉar se li-mem esperantiĝis antaŭ 9 jaroj, li sukcesis ekparoli nur de proksimume du jaroj.

Tamen, la aŭskultantaro siavice povis facile konstati, ke li tre bone parolas, prononcas kaj li sukcesis kapti ĝian atenton.

Scienca esplorado montris, ke en esperanto, sed ankaŭ veras en la franca, en la angla kaj certe en aliaj lingvoj, unue la skriba lingvo tute malsimilas la parolan lingvon kaj due, homoj oftege uzas samajn vortojn, kiuj cetere malmultas.

Plie, ni logike rajtus opinii, ke skriba lingvo estas pli facila, ĉar pli facilas korekti ĝin. Tamen, nia preleginto asertis, ke li trovis en libro skribita de konata kaj fama esperantisto, jenan frazon "ni devas manĝi" anstataŭ "ni manĝu" por traduki el la franca "nous devons manger". Alia ekzemplo: "li devas esti malfeliĉa" anstataŭ "li sendube estas malfelica" aŭ "certe malfeliĉas" por traduki "il doit être malheureux".

Do, ni traduku laŭidee kaj ne laŭvorte.

La preleginto donis poste kelkajn pliajn argumentojn tre interesajn, sed pli lingvistajn, kiujn mi fakte penadis noti kaj pri kiuj mi preferas ne raporti.

La aŭskultantaro profunde sentis konvinkon de la preleginto.

Sekvis debato pri lingvolernado kaj evidentiĝis, ke unusola metodo ne povas taŭgi por ĉiuj lernantoj: kelkaj povas kaj volas tuj paroli, aliaj bezonas jarojn por tion fari, multaj bezonas samtempe legadi, skribadi kaj paroli.

L.E.

### **KOMUNA TAGMANĜO**

La "Brasserie du Millenaire" gastigis 22 geesperantistojn, feliĉajn retrovi sin; la tagmanĝo estis tre simpatia, ĉar brilis la suno, varmeta vento blovetis. Ŝni ĝuis tian agrablan veteron sub la pinarboj kaj la sunombreloj aŭ ... ĉapeloj. La babilado akompanis la bongustajn manĝaĵojn, tiel ke ĉiuj deziras kaj esperas retrovi sin almenaŭ unu fojon per trimestro en venonta jaro!

Indikoj pri la dato kaj loko de la venonta en la septembra S.F.S.

### **REINSERTION ET ESPERANTO**

"Réinsertion et Esperanto" aĉetis multajn librojn ĉe U.E.A. en Roterdamo, por konsistigi librostokon, prezentotan al vi okaze de venontaj manifestacioj, speciale de federaciaj kunvenoj.

Staĝoj pri formado okazis en Montpellier (sabate aŭ sabate-dimanĉe) ĉe asocio "Passerelle" la 15an kaj 16an de aprilo kaj la 17an kaj 18an de junio kun 6 progresantoj kaj unu komencantino. La venonta staĝo okazos komence de oktobro.

La 30an de junio kaj la unuan de julio, ni iros al MILLAU. Ni havos budon por prezenti la internacian lingvon okaze de la proceso de José BOVE.

Ni ĉeestos dum la internacia semajno en LAZARET (SETE), de la 28<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis la tria de septembro 2000.

<<De la 4a ĝis la 7a de aprilo, mi kursis en "Montpellier" por du lernantinoj, Zohra kaj Melika. De novembro 99, ili intence kaj intense studas esperanton kadre de la asocio "Réinsertion et Espéranto" fondita de Thierry Saladin. La celo estas akiri de la triagrada ekzameno en unu jaro por profesia uzo de esperanto ekde la fino 2000. Serioze kaj diligente laborinte, Zohra kaj Melika jam akiris sufiĉe kontentigan nivelon sub la gvidado de Thierry >>. C.RIVIERE

**PERPIGNAN****BILANCO PRI AGADO DE LA ESPERANTO-CENTRO**

Nia grupo regule kunvenis ĉiumarde okaze de la kursoj. Du estis organizataj. La unua, por komencantoj, gvidata de JOLY kaj BENAŽET. Entute 11 ĝelernantoj sekvis tiujn kursojn.

Nia turisma libreto pri Perpignan estis sendita al Litovio, Ĉeĥio, Italio, Aŭstrio.

Ni daŭre rilatas kun nia korespondanto en Japanio, Sinjoro EGAWA, pere de "Internet", dank'al la zorgoj de Karlo, Philippe BOIX kaj Gilbert VAVDIN. Kunlaboro, kiel antaŭ kelkaj jaroj, por aperigotaj artikoloj en japana gazeto, estas antaŭvidita.

Nia sidejo, kie deĵoras Karlo, 72 avenue du Général de Gaulle, restis malfermita ĉiusabate matene kaj marde posttagmeze.

En la Ĝardeno de la sidejo, la klubanoj festis la 94an datrevenon de nia Prezidanto, Renato LLECH-WALTER, kiu per vigla paroladeto salutis kaj dankis ĉiujn ĝeĉeestantojn kaj aparte Charles GERARD-VOINCON, Georges JOLY kaj René BENAŽET por liaj kursoj. Li ankaŭ dankis la anojn de "Cercle d'Etudes", kies prilaborado permesis esperantan eldonon de broŝuro pri la vidindaĵoj de "Perpignan la Catalane".

Ni rediras al li niajn gratulojn kaj bondezirojn.

Aldone kaj fine, ni vane multe cerbumis kaj diskutis pri la akcepto de la Togolandano Kossi LOGOSSOU.

La Ĝenerala Asembleo okazos merkredon la 4an de oktobro 2000 ĉe la sidejo. Oni povas kontakti la Kulturancentron per interneto.

ret-ro: [charles.gerardvoicon@laposte.net](mailto:charles.gerardvoicon@laposte.net)

aŭ: [Pboix@club-internet.fr](mailto:Pboix@club-internet.fr)

La urbestro de Argelès promesas doni la nomon de Doktoro Zamenhof al nova strato en baldaŭa estonteco.

**BOULOURIS****AKTIVULA SEMAJNFINO**

La francoj estas strangaj homoj! Ili opinias ke aktivi estas voĉdoni, do la plej grava rezultato de la semajnfino estas la adopto de novaj statutoj por "Esperanto-France". El tiuj kiuj rajtas voĉdoni, unu federacio sin detenis kaj unu individuo kontraŭis. Jen, post du jaroj da zorgado, la novaj statutoj estas adoptitaj. Verŝajne, nun ĉiu ano rajtos voĉdoni por sia asocio. Krom tio ni aŭdis raporton de la komisiono pri eksteraj rilatoj (vere aktiva), ŝajnas ke almenaŭ unu Eŭropa parlamentano estas tre interesata pri la ebloj de Esperanto por la parlamenta laboro. Ankaŭ, oni kunvenis kaj zorgis pri TTT-ejo de Esperanto-France kaj pri la plibonigo de revuoj. Ni ankaŭ ĉeestis prezenton fare de tri knabinoj, kiuj eklernis esperanton ĉijare. Ili ludis teatraĵeton, parkere deklamis poemojn kaj kantis kantojn kune kun la ĉeestantoj.

Jean-Claude ROGET

**RAPORTETO PRI LA UNUA AKTIVULA SEMAJNFINO DE ESPERANTO-FRANCE**

Inter la 1a kaj la 4a de junio okazis en BOULOURIS apud Saint-Raphaël (83), membrokunveno de "Espéranto-France", membrokunveno de la provenca federacio kaj pluraj laborgrupoj pri la ĉefaj celtemoj de la asocio. Ĉirkaŭ 50 partoprenantoj tiel laboregis en varma etoso (pro la suno!).

Ni notu, ke estis voĉdone aprobitaj novaj statutoj kaj interna regularo de "Espéranto-France". Ĉiuj regionaj asocioj aŭ fakaj asocioj estas petitaj rilati kun la Ĝenerala Sekretario de "Espéranto-France" por subskribi novan laborkontrakton. Do via federacio povas ekde nun trastudi la projekton de nova kontrakto ellaborita de la Komuna Komisiono pri Strukturado (KKS), por ke ambaŭ statutoj estu 100 % kongruaj.

Laborgrupo pri Eksteraj Rilatoj okazis. Estis diskutitaj temoj kiel rilatoj kun la eŭroparlamentanoj, kontaktado kun francaj politikistoj, kun la nova ministerio pri edukado, kun EEU (Eŭrop-Unia Esperanto Unuiĝo) kaj ankaŭ partopreno de diversaj Esperanto-Asocioj en la Eŭropa projekto "Eŭroskola".

La franca sekcio de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), la GEE (Groupe des Enseignants Espérantophones) kunvenis post pluraj jaroj da neaktiveco. Nova estraro estis elektita sub gvidado de Jo CATIL.

Finfine, lasta novaĵo: **la Landa Kongreso de Esperanto 2001 okazos dum Pentekosto inter la 2a kaj la 4a de junio 2001 en Limoges.** Pluraj esperanto-asocioj tie kunvenos samtempe.

Olivier MOREAU [Omoreau@esperanto.org](mailto:Omoreau@esperanto.org)  
Ĝenerala Sekretario de "Espéranto-France"



## AMIKA SEMAJNFINA RENKONTO EN LOZERE

Sabaton 17an kaj dimanĉon 18an de junio kunvenis en Coperlac (Causse Méjean, 7 kilometrojn de Sainte Enimie) 24 esperantistoj plejparte el la regiono Langvedoko-Rusiljono kaj kelkaj eksterregionaj. Ne temis pri studado, cerbumado, prelegoj aŭ aliaj seriozaĵoj sed nur pri amika malstreĉa semajnfino en sovaĝa areo plena de floroj. Bonŝance, ankaŭ la suno ĉeestis.

Oni multe babilis (preskaŭ forgesis krokodili), bone manĝis kaj trinkis, piedpromenis sur la krutaĵojn de la "Gorges du Tarn" por admiri la panoramon: Saint Chély du Tarn, Hauterive kaj ĝia malnova kastelo, La Malène. Aŭte ni vizitis kelkajn famajn lokojn de la kanjono: Sainte Enimie, la Kastelo de la "Caze", la Malène. Ni eĉ, sabate nokte, per amatora teleskopo observis galaksiojn kaj belan plenan lunon, dank'al la klarigoj de Witold CAYZAC.

Vizitis, intervjuis kaj fotis nin ĵurnalisto de "Midi Libre". Espereble favora raporto baldaŭ aperos en la gazeto.

Tian simpatian etoson, ni esperas trovi multfoje kaj aliloke. Gérard PAING kaj Henryka OLEK proponis organizi venontan printempan semajnfino.

*La partoprenintoj en la semajnfino tute dankas Francis kaj Monique Bernard pro la bonega prizorgado kaj la agrabla kunvivado ĉe "Les Bories".*



LES BORIES - COPERLAC



### Tour de France et nouveau jeu de société...en espéranto !

Ĝus estas lanĉita nova grupa ludo "la etapo". Ĝi estas iom simila al "Monopoly"; temas pri biciklista etapkuro. La 5 versioj (franca, angla, germana, itala, hispana) havas E<sup>o</sup>-tradukon dorse de la regularo kaj de la ludkartoj. Sur la skatolo noto informas pri la E<sup>o</sup>-traduko, kaj kiel oni povas pliinformiĝi.

Tiu afero kostas nenion al la E<sup>o</sup>-movado kaj povas esti originala kaj efika propagandilo ĉe junularo. Reklamilon/informon pri tiu ludo vi povas ricevi de SFS.

La vendoprezco estas 250 F. Mendoj al France-Etapes S.A. 7, Rue du Dr Eynard 26300 Bourg de Péage. Parta pago nun (80F), sumo blokota ĝis sendo de la varo. Finpago poste.

Por ŝpari la sendkostojn (prezo: 200F anstataŭ 250F), vi povas ankaŭ mendi rekte al SFS ĝis la 1a de aŭgusto kaj vi ricevos en Sète la 2an de septembro. Atentu, ke ni ne ripetos la oferton!

Same kiel por la mendo de la tagmanĝo en Sète, NE PROKRASTU !





Staĝoj :

**SETE**  
*Internacia Semajno*  
**26/8 ĝis 2/9**

**BOURESSE (86)**  
**Centre "Kvinpetalo"**

- du 1 au 5. 08. 2000: Pratique pour enfants
- du 8 au 12. 08: Etude de textes français et Préparation à l'écrit Hautes Etudes
- du 16 au 19. 08: Evolution de la langue "de Zamenhof à Pic"
- du 01 au 05. 09: Astronomie: initiation et pratique
- du 08 au 13. 09: L'art du critique en espéranto

(Inf. J. Rapley 05 49 42 80 74)

**BAUGE (49)**  
**Château de Grésillon**

- du 15 au 21.07.2000: Cours 3 degrés, Chants, Promenades
- du 24 au 29.07: Cours 2 degrés, Présentation de thèse, Théâtre, Promenades
- du 31.07 au 05.08: Cours 3 degrés & Conférences G. Lagrange
- du 07.08 au 12.08: Cours 3 degrés et Couture
- du 14.08 au 19.08: Cours 2 degrés et divers: Amnesty, Ecologie, Conférences

(Inf. au 02 41 82 55 22 ou 05 59 27 18 88 M.T.LLoancy)

**Varbiloj/komunikiloj aĉeteblaj ĉe Esperanto-France**  
4bis, rue de la Cerisaie 75004 Paris CCP 85535 D Paris  
Prezoj sen la sendkostoj




0.50 FRF

kolora faldfolio 10x21cm, 10g



Unua rendevuo / po cent (500g) / senpage




2.50 FRF

kolora broŝureto 15x15cm, 28g



135 FRF

Vidbendo (UK de Montpellier) :23mn, en la franca lingvo



afiŝo formato A2 (40x60cm/25g)

Pochette 4.00 FRF



Kartona Koverto (22x31cm/ 45g)



Dossier 8.00 FRF

dosiero (formato A4, 45g)

**Esperanto interrete :**

Ĉar la reto ebligas al pli kaj pli da esperantistoj trovi informojn pri esperanto, jen kelkaj el la novaj adresoj en TTT (tutera teksaĵo / franclingve sur le net, sur internet) :

**Libroservo de UEA**

kompleta katalogo de libroj, diskoj, kasedoj, videofilmoj, insignoj k.a. varoj vendataj de la libroservo de UEA ĉe <http://www.uea.org/katalogo> (regule aktualiĝata)

**Plena kalendaro**

Pri esperantaj aranĝoj : <http://www.esperanto.hu> (se vi planas ion, ne forgesu menciigi ĝin al tiu adreso). Aktualigata ĉiun monaton. La listo ankaŭ aperas po monataj blokoj en "Eventoj", riceveblaj retroŝte : [kalendaro@esperanto.org](mailto:kalendaro@esperanto.org)

**Esperanto-novajservo**

Ĝi atingas multajn E<sup>o</sup>-asociojn, redaktorojn, aktivulojn, ktp. Por anoni ion okazontan, sendu mesaĝon al "ret-info@esperanto.org", kiu prizorgos la distribuadon.

**Fotoj de junulara kongreso :**

Fakte pri la lasta Internacia Junulara Festivalo okazinta en Italio kun pli ol 300 partoprenintoj. Por vidi tion, kio okazas en tiaj renkontoj, por rememori aŭ por uzi en artikoloj : <http://www.esperanto.it/iej/ijf/2000/fotoj/IJFote.html>

# MANIFESTE 2000



Le Manifeste 2000 pour une culture de la paix et de la non-violence a été formulé par des lauréats du Prix Nobel de la paix pour une prise de responsabilité qui commença au niveau de l'individu: ce n'est ni un appel ni une pétition s'adressant à des instances supérieures.

C'est la responsabilité de chaque être humain de traduire dans la réalité les valeurs, les attitudes et les comportements qui inspirent la culture de la paix. Car chacun peut agir dans ce but au sein de sa famille, de sa localité, de sa ville, de sa région et de son pays en favorisant la non-violence, la tolérance, le dialogue, la réconciliation, la justice et la solidarité au quotidien.

Le Manifeste 2000 a été rendu public à Paris le 4 mars 1999 et est proposé à la signature du grand public à travers le monde. L'objectif recherché est que cent millions de signatures soient présentées à l'aube du 3ème millénaire lors de l'Assemblée générale des Nations Unies en septembre 2000.

## Manifeste 2000 pour une culture de la paix et de la non-violence

Conscient de ma part de responsabilité face à l'avenir de l'humanité, et en particulier des enfants d'aujourd'hui et de demain, je prends l'engagement dans ma vie quotidienne, ma famille, mon travail, ma communauté, mon pays et ma région, de:

- respecter la vie et la dignité de chaque être humain sans discrimination ni préjugé;
- pratiquer la non-violence active, en rejetant la violence sous toutes ses formes: physique, sexuelle, psychologique, économique et sociale, en particulier envers les plus démunis et les plus vulnérables tels les enfants et les adolescents;
- partager mon temps et mes ressources matérielles en cultivant la générosité, afin de mettre fin à l'exclusion, à l'injustice et à l'oppression politique et économique;
- défendre la liberté d'expression et la diversité culturelle en privilégiant toujours l'écoute et le dialogue sans céder au fanatisme, à la médisance et au rejet d'autrui;
- promouvoir une consommation responsable et un mode de développement qui tiennent compte de l'importance de toutes les formes de vie et préservent l'équilibre des ressources naturelles de la planète;
- contribuer au développement de ma communauté, avec la pleine participation des femmes et dans le respect des principes démocratiques, afin de créer, ensemble, de nouvelles formes de solidarité.

**La Manifesto estas ankaŭ subskribebla en Interreto : [www.uea.org/2000.html](http://www.uea.org/2000.html)**

### Ma signature:

Toutes les signatures du Manifeste 2000 seront présentées à l'Assemblée Générale des Nations Unies en Septembre 2000.

Nom .....

Prénom .....

Date de Naissance: / /

Sexe:  Femme  Homme

Ville .....

Pays .....

Resendu al Universala Esperanto Asocio  
Nieuwe Binnenweg 176 / NL-3015 BJ Rotterdam / Nederlando,  
kiu prezentos ĉiujn subskribojn en septembro al la  
Ĝenerala Asembleo de Unuigintaj Nacioj

# MANIFESTO 2000



Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj senperforto estas verkita de ricevintoj de la pacpremio Nobel cele al respondeco, kiu komenciĝas je la nivelo de individuoj: ĝi ne estas alvoko aŭ peto direktata al superaj instancoj.

Ĉiu homo havas la respondecon apliki al la realo la valorojn, la sintenojn, kaj la kondutojn, kiuj estas ĉe la bazo de la kulturo de paco, ĉar ĉiu povas agi por ĉi tiu celo en la kadro de sia familio, de sia loĝ-loko, de sia urbo, de sia lando-parto, de sia lando kaj tiel ĉiu helpas senperforton, toleron, dialogon, repaciĝon, justecon kaj solidarecon en la ĉiutaga vivo.

Manifesto 2000 estis anoncita al la publiko en Parizo la 4-an de marto 1999-a kaj ĝi estis proponata por subskribado al la publiko tra la tuta mondo. La celo pristrebata estas, ke oni prezentu cent milionojn da subskriboj ĉe la komenciĝo de la 3-a jarmilo okaze de la Ĝenerala Asembleo de Unuigintaj Nacioj en septembro 2000-a.

## Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj senperforto

Konsciante pri mia parto de respondeco antaŭ la estonto de la homaro, kaj tute aparte de la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj, mi devigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia loĝ-loko:

- respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio kaj sen antaŭjuĝoj;
- praktiki aktivan senperforton, rezignante pri perforto en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psiĥologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj;
- kundividi mian tempon kaj miajn materialajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon;
- defendi la esprim-liberecon kaj la kulturen malsamecon, ĉiam favorante aŭskultadon kaj dialogon kaj ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj malakcepto de aliaj homoj;
- favori respondecan konsumadon kaj evoluon, kiuj konsideras la gravecon de ĉiuj vivo-formoj kaj konservas la ekvilibron de la naturaj rimedoj de nia planedo;
- kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno ankaŭ de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, cele al kuna kreado de novaj solidarec-formoj.

KULTURO DE PACO



### Mia subskribo:

Ĉiuj subskriboj de la Manifesto 2000 estos prezentataj al la Ĝenerala Asembleo de Unuigintaj Nacioj en septembro 2000-a.

Familia nomo .....

Persona nomo .....

Naskiĝdato / /

Sekso:  Virino  Viro

Loĝ-urbo .....

Lando .....

## LA 55A KONGRESO DE SAT-AMIKARO EN FOUQUIERES-LEZ-LENS

La esperantista urbestro de FOUQUIERES-lez-LENS kaj O.K.K. prezidanto Michel BOUCHEZ akceptis la 55an SAT-AMIKARAN KONGRESON de la 22a ĝis la 25a de aprilo 2000. Partoprenis 6 personoj el nia regiono

La ĉefa temo de la kongreso estis la historio de la eks-karbomina baseno kaj la nunaj problemoj heredataj el la karbekspluatado: ĉar la subtero estas tute borita, oni timas venontajn damaĝojn, kaj, ĉar la karbobaseno perdis 200 000 laborpostenojn, la senlaboreco superas 20 procentojn.

Du duontagaj ekskursoj konsistis el piedpromenadoj sur karbaj teramasoj.

Dum la tuttaga ekskurso, la partoprenantoj vizitis la Minan Muzeon de LEWARDE, apud DOUAI, la monteton de VIRMY kie 11 285 kanadaj soldatoj estis mortigitaj dum bataloj de la unua mondmilito kaj la monteton NOTRE-DAME DE LORETTE kie oni batalis dum unu jaro.

Krom tio, kompreneble, okazis prelegoj, ekzemple pri Japanio kaj Ĉinio (fare de japanino kaj de ĉina paro), distraj vesperoj, k.t.p.

Domaĝe ke malmultis la partoprenantoj ĉar la kongreso estis tre bone organizita, ni havis ŝancon esti gvidataj de esperantista urbestro, kiu sukcesis interesi nin pri tute ne turisma regiono.

F. kaj M. B.

### "Le Pays Briard"

Certe tiu gazeto ne estas konata de vi, krom se vi havas parencojn en la pariza regiono. Nia amiko Maurice Sujet regule sendas al tiu gazeto kontribuojn pri la lingva problemoj kaj sufiĉe ofte aperas liaj leteroj aŭ la redaktoro komentas favore pri esperanto. Tiel la 27an de junio pri "minacoj kontraŭ la angla lingvo" (oni jam klasifikas 40 varĉojn de la angla lingvo) kun longa ĉapitro favore al esperanto. Samdate aperis alia artikolo pri freŝdata vojaĝo de Maurice al Pekino. Li estis unu el la ses gajnintoj de konkurso okaze de la 50a datreveno de Radio Pekino. Ne mankis lingvaj problemoj por la aliaj konkursintoj, kvankam ilin akompanis interpretistinoj. Maurice konkursis en esperanto, estis akompanata de E<sup>o</sup>-interpretistino, kaj la aliaj miris pro ilia facileco por komuniki. Jen parto de la teksto en la franca (tradukado riskus iom perfidi la belecon de la frazoj). Se malĝojigis vin la komentoj de iuj ĵurnalistoj sur la unua pago, jen aliaj pli ĝojigaj:

"/ Les Chinois ont la tête moins dure que les Européens. Ils croient à l'espéranto, eux, parce que c'est une langue à la fois très facile, donc économique et qui pourrait constituer le moyen de communication idéal, égalitaire et très élégant entre tous les peuples de la terre. Oui, l'espéranto est une belle langue. Ecoutez la sur une cassette et vous serez séduits /." (Adreso de la redaktoro Michel Vincent: 18, Rue de la Pêcherie BP9 77521 Coulommiers Cedex) La du tekstoj estas haveblaj ĉe SFS.

### Esperanto-Info

Ne nur renaskiĝis Greziljono (vidu P. 3) sed ankaŭ "Esperanto-Info", franclingva revuo pri E<sup>o</sup>, pli frue redaktita de Robert Llorens. Reprenis la torĉon Robert Tosoni 9, Rue du château d'eau 82290 Meuzac.

Jara abono kostas 50 F (subtenabono 60F), CCP Marseille 11 901 46 B: Esperanto-info.

Novajfo de la lasta numero estas dulingva teksto kaj paĝo kun utilaj esprimoj. La artikoloj el diversaj E<sup>o</sup>-gazetoj estas freŝdataj. Bonan sukceson al "Esperanto-info"

### ZEO-urboplanoj :

ZEO estas Zamenhof/Esperanto objekto: strato, placo, parko, tabulo, monumento, E<sup>o</sup>-centro...

En la mondo estas centoj da ili. Nia amiko Raymond Boré, delegito en Chambéry, jam listigis ilin kaj fotis multajn. Sed kiel trovi ilin facile, speciale eksterlande kaj same kiel viziti la urbojn, kie ili troviĝas?

Pro tio la ideo de planeto sur malgranda folio (formato A4) kun la esencaj indikoj.

Jam pli ol tricient ZEO-urboplanoj estas pretaj (inter kiuj 130 por Francio; unu el la lastaj preparitaj estas tiu de Bouresse kun ĝia E<sup>o</sup>-centro "la kvinpetalo").

Vojaĝante al Bouresse aŭ al aliaj urboj kun ZEO, provizu vin per tiuj utilaj urbo-planoj je via dispono ĉe R. Boré, 481 Square Zamenhof, 73000 Chambéry

*Gratulojn al nia amiko pro la interesa iniciato !*

### Eŭroregiono :

"Kataluna Esperantisto", la organo de KEA, dediĉis 2 paĝojn en la marta numero al la eŭroregiono: Katalunio + Sudpireneoj + Langvedoko-Rusiljono. Tutpaĝa artikolo pritraktas la temon de "la interregiona kooperado en la kadro de la Eŭropa Unio". Sur la tereno de kooperado inter esperantistoj ni kune jam faris la unuajn paŝojn.



## OKAZE DE EŬROPA KONGRESO

Ekzistas pluraj manieroj vojaĝi al kongreso. Ekzemple iri rekte kaj reveni same, la rekta metodo! Alia maniero estas profiti la okazon por viziti plurajn lokojn. Por ni, fine de Aprilo, komence de Majo estis sur la listo la Sat-Amikara kongreso en Fouquières, geamikoj en Gent, la 4a Eŭropa Esperanto-Unio en Ostende, allogaĵoj en Londono okaze de la dumila jaro (Millennium), familianoj en Normandio. Fine, pro tempolimigo, ni nur forstrekis la unuan eblecon.

En Gent ni retrovis familion Bernard kaj kune vizitis familion Bouman. Ili ne nur vizitigis al ni sian belegan urbon sed ankaŭ elstaran florekspozicion, kiu disvolviĝas nur ĉiun kvaran jaron. Tutan posttagmezon ni promenadis, aŭ pli precize procesiis pro la nombro da vizitantoj, tra florbedoj. Speciale abundis orkideoj kaj rododendroj, ĉar estas multaj kulturistoj de tiuj plantoj ĉirkaŭ Gent. Mirinda kaj neforgesinda spektaklo! Malvarmeta vetero atendis nin en Ostende sed pli varma etoso en la Eŭropa kongreso. Aliĝis 350 personoj el 20 landoj, partoprenis 8 el nia regiono (almenaŭ du pliaj aliĝis). La kongreso akiris la altan protekton de la belga reĝo, en la Honora Komitato Interkulture estis la tuta provinca estraro kaj la urbestro, en la Honora Listo de la kongreso estis dek ministroj, i.a. la ĉefministro kaj 16 eŭroparlamentanoj... Parenteze el la 86 eŭroparlamentanoj, kiuj iel subtenas esperanton, 15 estas el Belgio kaj 13 el Francio! Se venis multaj Belgoj kaj Francoj al la kongreso (po cento), malmultis najbaraj Britoj kaj Nederlandanoj.

Interesaj prelegoj dum la solena inaŭguro (fare de Stefan MacGill (virtuala lernejo) kaj Zlasko Tišlar (eŭropa identeco)), dum vizito al Bruselo kun komparo inter lingva komunikado kaj akvo-mastrumado, dum ŝipkrozado (pri marmamuloj (W. De Smet) kaj pri okjara vojaĝo tra la mondo (vi jam divenis la nomojn de la prelegintoj)). Vizito al nefacile atingita (!) kompoŝtejo (la temo de la kongreso estis ja pri ekologio), al la "Atlantika murego" (pri la dua mondmilito) kaj tuttaga pertrajna ekskurso al Bruselo. Ĉiĉeronis por la busa vizito de la ĉefurbo Neven Kovačić, Kroato, kiun ni gastigis antaŭ kelkaj jaroj, kiam li prelegis tra Francio kaj avertis nin pri la riskoj de milito kun Serbio... Li gvidas nun turistojn en Bruselo en pli ol dek lingvoj, inter kiuj esperanto. La vizito plej atendata de mi estis la vizito al la Eŭropa Parlamentejo kaj la renkonto kun Eŭrodeputitoj. Imponaj konstruaĵoj sed senvivaj salonoj; aperis nur unu deputito, ĉar la aliaj senkulpiĝis pro parlamenta ferio! Ne estas ĉiam facile organizi kongreson!

Entute ni ĝuis tiun kongreson kaj jam notis la daton kaj lokon de la venonta: **en 2002 en Verona**.

El Calais ni transsaltis la Manikon (la maron) en duonhoro per teraplano (aerkusena ŝipo). Kvankam la duono de la pasaĝeroj estis francparolantaj, la klarigoj kaj salutoj estis nur en la angla... Perbuse el Dover ĝis Londono. Tiu metropolo restas miksaĵo de tradicioj kaj modernismo, seriozeco kaj humuro. Pro la elekto de nova urbestro, oni ekspoziciis kaj promenigis porkon, kiu simbolicas kandidaton. Imagu tion en Parizo! Malpli plaĉis al la loka loĝantaro la farbado de statuoj de naciaj herooj... Svarmas enurbe turistoj el plej diversaj landoj.

Pri la manifestadoj koncerne "Millennium" estis duonsukceso. Nova ponteto super la Tamizo pendolas, la funkciado de la radego estis prokrastita pro sekureco kaj la kupolo estas finance kondamnita (the doomed dome)... Tiu lasta estas tendego, kiu povus enteni la grandan piramidon aŭ la turon de Eiffel (en horizontala pozicio!); por ĝin rapide atingi oni konstruis novan metroo-linion. La kupolo situas sur la meridiano de Greenwich (apuda antaŭurbo). Interesa spektaklo sed la vizito estas multekosta kaj ĉiuj klarigoj kaj komentoj (foje iom naciismaj) estas nur en la angla, pro tio forestas eksterlandaj turistoj! Strange, ke oni pledas por "hejma" vivado kaj komunikado nur pere de modernaj rimedoj. Ĉu estontece la diversaj eŭropaj nacioj ne dependos unuj de aliaj?

La diametro de la radego en la urbocentro estas 135metra. Ĝi portas 32 celojn, en ĉiu povas sidi aŭ stari 25 personoj. Rotacio daŭras duonhoron. Malgraŭ timo, la rondirado ne impresas. Oni povas malkovri grandan parton de Londono el nekutima

angulo, ekzemple ni spektis la ŝanĝon de la gardistoj je la

Palaco de Buckingham en dukilometra distanco.


Ni profitis nian viziton en Londono por partopreni en la ĉiusemajna kunveno de la loka grupo. Taso da teo unue por interkonatiĝi kaj babili. Poste prelego de Germanino kaj kantoj kaj dancoj de deko da 10jaraj lernantoj el Sankt Peterburgo (E<sup>o</sup> estas oficiale instruata en ilia lernejo kaj iuj el ili jam bone elturniĝas). Fine forumo pri diversaj temoj. Ĉeestis dekkvino da personoj; interesa travivaĵo por ni.

Ni pasigis entute du semajnojn en tre diversaj lokoj kaj havis la okazon multon vidi. Kien venontfoje?

J. Hénin



La radego 2000 (diametro : 135 m) en Londono. maldekstre : la Abatejo de Westminster, la Parlamentejo kaj la turo de Big Ben; dekstre : sur la fono trans la ponto la radego



La radego 1900 (diametro : 100 m) instalita en Parizo por la universala ekspozicio, poste malmuntita kaj transportita al Vieno (Aŭstrio).

## LETERO DE LEGANTO

Nia amiko Roger Colney el Gap, al kiu ni deziras rapidan resaniĝon post akcidento, skribis pri la statistikoj de lernataj lingvoj en nia edukstemo (SFS 152, p.11) :

Kiam la angla rompas la pordojn... de logiko.

Mi neniam tre fidis la statistikojn. Ja, per ili oni pli malpli kredigas al la legantoj tion, kion oni volas, laŭ la prezentado. Tio validas ankaŭ por la sondadoj, kies rezultatoj ege dependas de la maniero per kiu oni prezentas la demandojn. Tial mi restis iom perpleksa post lego de la artikoleto aperinta en la n° 152 paĝo 11 de la bulteno "Sudfrancia Stelo" kaj rigardo de la grafikoj.

Certe ĉiuj scias, ke la angla ne nur estas prioritare elektita de la gepatroj, sed ankaŭ ke ĝi estas la sola lingvo instruata (mi ŝatus skribi trudata) en ĉiuj kolegioj de Francio, male al la aliaj lingvoj, el kiuj kelkaj estas alireblaj nur en malmultaj institutoj.

Sur la grafikoj mi unue vidas kun miro, ke restas nur 1 procento por ĉiuj aliaj lingvoj krom la angla kaj la germana, tial ke ambaŭ sumas 99 procentojn. Mi ankoraŭ pli miras kiam, sur la skemo pri la due lernataj lingvoj, la angla rompas la murojn de... logiko. Ja, adiciante 89,5% kiel unua lingvo mi havas penon por kompreni, ke ĝi povas allogi ankoraŭ 11% kiel lernobjekto en dua lingvo. Kun bedaŭro mi scias ke, pro privilegiata pozicio, tamtamo en televido kaj amas(mis)informiloj la "ŝekspira" lingvo ĝuas favoron ne nur de gepatroj, de publika instruado sed de ĉiuj "deciduloj", kiuj tenadas la ĉenojn (katenojn) de ĉiuj ekonomiaj kaj financaj sektoroj. Plie ni ne ignoras, ke en ekzamenoj oni atribuas al la angla saman altgradan koeficienton (en Francio) kiel al la franca kaj al matematikoj. Estas ĝuste pro tio ke, en tiu dua grafiko, mi ne plu "perdas mian latinon" sed ankaŭ dubas pri miaj plej elementaj aritmetikaj konoj.

R. Colney

*NDLR: Nu, nia leganto certe kapablas adicii ! La uzitaj statistikoj (el longa artikolo aperinta en "Le Monde") montras tendencojn. La unua grafikaĵo koncernas la sesan klason, la dua la kvaran klason. Pli precize la artikolo indikas, ke entute 97 procentoj de la gelernantoj lernas la anglan. Estas konate, ke pro ekonomiaj kialoj, oni reduktis la nombron da instruataj lingvoj en kolegioj. Kaj en liceoj oni fermas klasojn de la tria lingvo, kiam la nombro da gelernantoj ne estas sufiĉa (15) kaj tio oftigas pro la lasta reformo (novaj elektelecoj, nombro da elektelecoj je bakalairo). Pri la "altgrada koeficiento" de la angla en ekzamenoj, ni ne troigu ! Demandu al 15jarulo, kiu trapasas "brevet". La angla tiam povas havi la saman koeficienton kiel muziko ! Kaj ĝi eĉ ne plu estas deviga je la parola parto de la ekzameno. Finfine la ĉefa demando estu : ĉu el niaj gejunuloj (preskaŭ ĉiuj lernas la anglan, ĉu ne?) multaj kapablas flue paroli la lingvon? Kaj kelkajn jarojn post la fino de la studoj, pro nenia aŭ neofta uzado de la lingvo, kiel statas la afero ? Iuj malfavorantoj de esperanto asertas, ke ĉiuj homoj komprenas aŭ parolas la anglan... Mankas statistikoj pri tio !*

J. Hénin

## M. LANG S'INTERESSE AUX LANGUES

Chaque ministre de l'Education apporte sa réforme et M. Lang ne fait pas exception. Il vient de communiquer (à droite, extrait du "Midi Libre" du 21 juin) ses projets pour l'école primaire dont un volet concerne l'enseignement des langues.

En attendant d'en savoir plus (place des langues régionales, horaires, formation des maîtres, choix proposé -probablement le trio habituel...), il est permis d'être réservé.

L'apprentissage d'une langue dès le cours moyen, promis par M. Allègre pour 98, n'a pu être généralisé. Il a été mis en place "d'une manière disparate et limité par le manque de personnels qualifiés" ("Le Monde" des 27-28 février 2000). Alors, l'apprentissage de deux langues, dont l'une dès la maternelle, sans parler des autres volets de la réforme, signifie un grand nombre prévisible de difficultés.

M. Lang avait posé il y a quelque temps à son successeur-prédécesseur une question écrite sur l'introduction de l'espéranto dans le système éducatif. Son intérêt pour la langue internationale est-il resté le même, une fois endossée la charge ministérielle ? Ou était-il purement occasionnel ?

D'ici 2005, beaucoup d'eau coulera sous les ponts...

P.S. Lors de sa récente visite à Berlin (Le Monde du 28/6) M. Chirac "a plaidé pour le trilinguisme en Europe" (peut-être espère-t-il encore un peu naïvement que nos voisins apprendront le français après l'anglais) et "déploré le manque de professeurs d'allemand compétents".

M. Allègre et M. Lang devraient l'informer davantage du nombre de postes d'allemand supprimés ces dernières années !

=====

Mais la grande ambition du ministre est le développement des langues vivantes à l'école. « Aujourd'hui, plus de 80 % des élèves de CM2 apprennent une langue étrangère. Nous devons généraliser cet enseignement. Et dans six ans, l'apprentissage d'une seconde langue s'effectuera dès le CP », ajoutait-il hier. Pour les langues régionales, le ministre a indiqué que le débat restait ouvert : « Aujourd'hui deux voies sont ouvertes dans l'enseigne-

ment publiques : initiation et bilinguisme. On envisage également l'intégration dans l'enseignement public des établissements pratiquant l'enseignement des langues régionales par immersions ».

Pour assurer les cours de langues étrangères, le ministre compte sur l'enthousiasme des instituteurs qui bénéficieront d'une formation. Il pense aussi recruter des profs de langues volontaires de lycées ou collèges et renforcer l'intervention d'interlocuteurs natifs et d'assistants étrangers.

Les deux associations de parents d'élèves FCPE et PEEP se demandent comment ces objectifs vont être réalisés, notamment pour mettre en place un enseignement vivant des langues. ●

## Vie et mort des langues :

Ces dernières semaines, différentes revues se sont penchées sur le sort des langues . Citons pêle-mêle : "Courrier international" du 24/2, "Libération" du 10/4, "Le Courrier de l'Unesco" d'avril, "Newsweek" du 19/6, "Esperanto" de juin... Si toutes ne donnent pas exactement les mêmes chiffres, toutes font des prévisions dans le même sens . La moitié à 95% des langues actuelles disparaîtraient dans ce siècle ou le prochain . Le rythme de disparition varie : 10 par an (Esperanto), une tous les 15 jours (Courrier international). Pour CI cette disparition devrait nous préoccuper, alors que Newsweek demande un peu cyniquement : "Should we care? (devrions nous...)"

51 langues n'auraient plus qu'un locuteur, 500 moins de 100, 1500 moins de mille, 3000 moins de 10.000 et 5000 moins de 100.000. La communauté européenne, qui a 50 langues minoritaires représentant 50 millions de citoyens, a vu la disparition de 13 langues, 9 langues sont quasi éteintes, 26 sont gravement menacées dont le breton, 38 sont menacées dont le basque et 10 potentiellement menacées dont le corse. Les USA, où les "pionniers" ont fait disparaître 300 langues, en perdraient 75 au cours du siècle; l'Australie, qui en a fait périr 150 en deux siècles, en verrait encore 140 s'éteindre (pour ne citer que deux pays prétendant défendre les droits de l'homme). De tous temps des langues sont nées, ont disparu, ont évolué...Le latin a donné naissance à toute une famille de langues (du français au portugais en passant par l'italien, l'espagnol, le catalan ou l'occitan) . Et pourtant, un Français ne comprend pas un Portugais ! Le français a donné naissance aussi à toutes sortes de créoles et dialectes . De la même manière, les langues de grande diffusion comme l'anglais, l'espagnol ou l'arabe sont menacées du même processus de diversification . L'anglais compte déjà une quarantaine de variantes . Où en sera-t-il dans un siècle ? Pour des raisons politiques aussi, les langues évoluent ou se séparent : dans les années 20, le turc a chassé de son vocabulaire les mots d'origine arabe; depuis un demi-siècle, l'hindi et l'ourdou ont tendance à s'éloigner ; plus récemment, le tchèque et le slovaque d'une part, le croate, le bosniaque et le serbe d'autre part (autrefois membres associés dans le serbo-croate) ont chacun repris un chemin différent... D'après le Courrier de l'Unesco, seulement trois cents mots existeraient dans toutes les langues avec le même sens...


Pour en revenir aux chiffres et aux pourcentages (je connais un lecteur qui va y perdre son latin !), considérés comme une indication plus ou moins précise mais révélatrice, 96% des langues sont parlées par 4% de la population mondiale alors que la moitié du globe s'exprime dans une des huit langues les plus usitées, à savoir le chinois (1,2 milliard de locuteurs), l'anglais (478 millions), l'hindi/ourdou (437), l'espagnol (392), le russe (284), l'arabe (225), le portugais (184), le français (125). Selon d'autres sources, le français ne serait qu'en 15<sup>e</sup> position...

A noter que les chiffres du schéma ci-dessous diffèrent mais concernent un emploi quotidien en langue maternelle ou deuxième langue .

Pour terminer, la conception du trilinguisme prônée par l'Unesco ( à comparer à celle de M. Chirac exposée sur la page précédente) : langue maternelle + langue de voisinage + langue internationale .


Sur le problème des langues, les discussions ne sont pas terminées . Et si on proposait l'espéranto (cité dans l'une des revues) pour une communication meilleure (plus juste et plus simple) ?

J.H.





## KRUCVORTOJ



- I) Flugaparato(o).
- II) Parolfiguro.
- III) Ne plu sklavec(o).
- IV) Ŝanĝi / Serpent(o) / Subjunkcio.
- V) Fine alkoholiĝi / Fiksilo(o).
- VI) Kiel mirakle fiŝkapti.
- VII) s : Helena orelo / Malica kaprodo.
- VIII) Por ŝ osi kontraŭflanke.
- IX) Granda bird(o) / s : Lingvo / Gamnoto.
- X) Do vundito(o).
- 1) Balbek kaj On.
- 2) Gorĝbrulumo.
- 3) Korolpart(o) ĉe kelkaj floroj / Komenco de midia-
- 4) Malvire / 6 el 10<sup>9</sup> -zo.
- 5) Ujo(o) / s : Fiŝo ĉe veste.
- 6) Por skribi korekte.
- 7) Amelenzimo(o) / s : Helena tribestro.
- 8) Nuanco(o) / Vivujo(o).
- 9) Granda profeto(o), evitinda / Pronomo.
- 10) Lakmusdono(a) / Inflamo(o).

Horizontale

Vertikale

Solvej de la 152a

H	K	O	N	J	U	N	K	T	U	R
H	O	R	D	I	N	A	R	U	L	O
H	N	T	■	D	I	L	U	A	N	T
H	J	O	N	O	S	F	E	R	■	E
V	U	P	A	■	O	■	L	E	P	R
V	N	T	N	T	N	T	■	G	A	B
V	K	E	K	S	■	J	A	L	T	A
V	T	R	I	■	K	U	L	A	■	M
X	I	O	N	I	K	■	I	N	K	A
X	V	J	■	A	N	T	E	D	O	N
	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10

## ANEKDOTOJ

- Sinjoro doktoro, kion mi faru, por ke mi povu vivi cent jarojn ?
- Ĉu vi drinkas, fumas, amindumas virinojn aŭ ludas kartojn ?
- Ne, neniu el tiuj aferoj interesas min .
- Tiam iru al diablo! Kion vi volus dum tiuj cent jaroj fari en tiu-ĉi mondo ?

\*\*\*\*\*

Gasto en restoracio atente studas la menuon kaj poste demandas la kelneron :

- Kio estas tio via "Kokido a la Mercedes" ?
- Tio estas la kokido, kiun nia estro hieraŭ veturmortigis per sia aŭto .

\*\*\*\*\*

- Aŭskultu, diras gasto al la por-
- disto en la hotelo, la lifto denove ne funkcias .
- La lifto estas en ordo, trunkvili-
- ligas lin la pordisto, sed vi jam duonhoron staras en la telefonkiosko .

\*\*\*\*\*

Al kuracisto venas juna virino kun ekimozoj. Je liaj demandoj ŝi konfesas, ke la ekimozoj estas la verko de ŝia edzo.

- Mi pensis, ke via edzo estas forvojaĝinta, miras la kuracisto.
- Ankaŭ mi pensis tion, konfesas la edzino .

\*\*\*\*\*

La venonta SFS aperos komence de Oktobro.  
Bonvolu sendi viajn kontribuojn  
antaŭ la fino de Septembro al Jean Hénin  
Beauregard - Route de Montcayroux  
48500 La Canourgue Tel/Fax : 0466328636  
[Jean.Henin@wanadoo.fr](mailto:Jean.Henin@wanadoo.fr)

BOPARO.

**A**grablajn somerferiojn!